

# La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Julifine en Trivero .....	2	Ci kaj vi en Esperanto .....	10
Esperanta boatado en Kroatio .....	4	Lingwa de Planeta .....	17
8-a MEKARO ne elrevigis ! .....	5	Esperantistaj enmigrantoj.....	21
Esperanto en la franca poŝt-servo ! .	6	Kiel traduki ? .....	25
L'esperanto : une langue par choix !	7	150 000 artikoloj en E-Vikipedio .....	29
La cimo de l' jaro 2038 .....	9	Montrealaj k apudaj E-kunvenoj.....	31

## Reveno al Tririvero

## À Trois-Rivières de nouveau!



# Julifine en Tririvero

Francisko Lorrain

*Treize espérantistes, dont une chienne, se sont rencontrés à Trois-Rivières durant la dernière fin de semaine de juillet, à l'invitation de Suzanne Roy. Il a fait beau. Nous avons visité le Musée du papier, le Parc de la Rivière Batiscan, beaucoup parlé, et dégusté chez Suzanne d'excellents plats végétaliens préparés par Karlo.*

En la lasta Riverego, Suzano Roy, el Tririvero, invitis nin pasigi la du lastajn tagojn de julio — sabaton kaj dimanĉon — en sia urbo. Entute dek tri homoj partoprenis en almenaŭ parto de la tuta programo.



El Montrealo venis Joël, Ĵenja, Den, Karlo, Espero (la poliglota hundo de Den kaj Karlo — ŝi komprenas kaj la hispanan kaj Esperanton) kaj Francisko Lorrain. Vizitis nin dimanĉon matene Normano Legault, nun loĝanta en Kebeko. El la tririveraj Esperantistoj partoprenis Viviane kaj Louise, lernantinoj de Suzano, Francisko Gauthier kaj lia amikino Kamij (kiu avida studas Esperanton kaj rapide lernas), kaj, laste, sed ne malĉefe, Suzano Roy, kaj ankaŭ ŝia simpatia koramiko Michel, kiu

iom studis nian lingvon kaj kunmanĝis kun ni. Kvar montrealanoj loĝis ĉe Suzano, alia ĉe Francisko Gauthier, tute proksime, en la centra, malnova, tre agrabla, riveregborda kvartalo de la urbo.

Eble ne ĉiuj legantoj scias, kial tiu urbo nomiĝas Tririvero. Nu, ĝi situas ĉe la kunfluejo de

la rivero Saint-Maurice kaj riverego Saint-Laurent. Sed kiu estas la tria rivero? Ne estas tria rivero tie. La nomo de la urbo devenas de alia fakto: se oni veturas laŭ Sankta-Laŭrenco kaj pasas antaŭ la elfluejo de Saint-Maurice, ŝajnas, kvazaŭ tri riveroj tie enfluus en la riveregon. Fakte estas nur unu, sed en ĝi kuŝas kvin insuloj, el kiuj du klare videblas el la riverego, kreante la iluzion pri tri riveroj. Nomis la

lokon Trois-Rivières iu kapitano Dupont-Gravé en 1599, plurajn jarojn post la paso de Jacques Cartier tiuloke en 1535.

Sed kion ni, en 2011, faris? Sabate posttagmeze ni vizitis la Muzeon pri papero. Tririvero estis kaj daŭre restas grava paperfabrika urbo. La muzeo estas starigita en malnova konstruaĵo, kies funkcio

estis pumpi, rekte el la rivero Saint-Maurice, la grandajn kvantojn da akvo necesajn por fari paperon. Oni metis en la muzeon malnovan paperfabrikan maŝinon antaŭe uzatan en lernejo pri paperfabrikado. Tiu maŝino estas grandega, sed tamen, kiel nura lerneja maŝino, multe malpli granda ol la tiamaj industriaj maŝinoj, kiuj mem multe malpligrandas ol la nuntempaj.

Poste ni kune vespermanĝis ĉe Suzano, post kio Karlo, Suzano kaj Kamij iom pianludis.

Dimanĉe ni longe matenmanĝis, denove hejme ĉe Suzano. Ni frandis interalie bonegan vegetaĵan (senovan) « omleton », preparitan de nia vegetaĵa

kuirartisto Karlo. Ne maltrafu ajnan okazon gustumi liajn kreaĵojn !

Poste ni aŭtis norden, tra la profunda kebekia kamparo, al la natura parko de la rivero Batiscan. Tiu rivero vere belegas. En sia suda parto ĝi estas simpla, trankvila, bela rivero. Sed en la parko ĝi fariĝas sinsekvo de akvofaloj, tra impresaj

rokegaĵoj. Tie kelkaj aventuremuloj transiras la riveron per kablo streĉita inter la du bordoj.

Ni piknikis apud riverborda plaĝo. En pezega kofro plena je glacio staris abundega provizo de biero, kiu en kelkaj horoj tute forglutiĝis. Tamen, iel mirakle,

neniu ebriiĝis. Pluraj naĝis en la rivero.

Antaŭ kelkaj jaroj, multaj lokanoj, inter kiuj grave rolis Michel, unuiĝis en asocio nomata Amikoj de la rivero Batiscan, por malhelpi la konstruon de granda elektroprodukta baraĵo tra tiu rivero. Dank' al iliaj streboj la rivero konserviĝis en sia natura stato !



## Esperanta boatado en Kroatio

*Zdravka Metz*

Mi revenis de Kroatio, kie mi, la unuan fojon, partoprenis boatadon sur rivero Kupa.

Esperanto-Societo el Sisak kaj ĝia aktiva membro Srecko Radulovic organizis la trian fojon la boatadon sur Kupa dum 5 tagoj. En tiu evento partoprenis aliaj E-societoj, kiujn unuigas KEL (Kroata E-Ligo).

Kvin bravuloj komencis en Karolovac, kaj ili ĉiutage boatis per tri tradiciaj boatetoj, ligitaj unu kun la alia, uzante etan motoron por pli rapide flosi al la fino — urbo Sisak. Ĉiuvespere ili tendumis apud la rivero kaj faris la fajron, sur kiu ili kuiris la manĝojn. Mi povis gustumi bongustajn fazeolojn...

Mi partoprenis la kvaran tagon, kaj mi vere ĝuis amikan etoson, la naturon, la silenton, kiam damaĝiĝis la motoro kaj ni devis remi. Ne, ne malfacilis la remado — ĉiu havis remilon, kaj kune ni ja progresis preskaŭ same rapide kiel per la motoro. Ni atingis antaŭurbon de Petrinja, Brest. Tie ni, kune kun la loka loĝantaro, ĉeestis etan ceremonion — meti kandelojn kaj florojn por la mortintaj partoprenintoj de la lasta milito, kiu finiĝis la 5-an de aŭgusto 1995. La loka loĝantaro preparis agrablan fraterniĝon kun muziko, manĝo kaj interkonatiĝo.

Kroata E-Ligo donacis instrulibrojn al la urbaj bibliotekoj de Brest kaj Petrinja. KEL havis ĉiutage reprezentanton, kiu, eĉ ne partoprenante la boatadon, tamen helpis informi la publikon pri la Internacia Lingvo.

# La 8-a MEKARO ne elrevigis !

*Trefflé (Trefleo) Mercier, Ŝerbruko*

*Nous étions 39 à Kingston en mai. C'est une ville agréable, intéressante du point de vue historique. Le programme des activités était très bien dosé. J'aime retrouver cette atmosphère de tolérance et de respect mutuel, typique des réunions espérantistes.*

En majo mi partoprenis mian unuan MEKAROn en Kingstono kaj ŝatus dividi miajn impresojn kun la legantaro de *La Riverego*. Mi sciis antaŭe, ke la celo de tiuj jaraj renkontiĝoj estas turismi, viziti kaj interŝanĝi spertojn en frateca etoso. Tiurilate mi ne estis elrevigita. La programo estis bone ekvilibrigita por havi sufiĉan tempon por ĉiu programita ero. Ĝi permesis pli bone konatiĝi kun la urbo, kiu estas tre interesa laŭ diversaj vidpunktoj, sed speciale laŭ la historia aspekto. Estis agrable promeni en la malnovaj stratoj, vidi la belajn historiajn domojn de la unuaj enloĝantoj, kaj viziti historiajn lokojn, kiel la fortikaĵon Fort Henry kaj Bellevue House.

La loĝado estis tute taŭga por tiu tritaga evento kaj malmultekosta. Fakte, ĉio estis malmultekosta, inkluzive la manĝojn. La plej altaj kostoj estis por la partoprenintoj, kiuj venis el foraj lokoj, kiel Pensilvanio kaj Marilando.



La aparte agrabla aspekto por mi estas re trovi la tipan Esperantotoson de respektemo kaj toleremo inter ĉiuj malgraŭ malsamecoj pri aĝo, raso, religio, politiko, sekso kaj seksorientiĝo. Mi havis la impreson, ke la grava afero inter ni estas, ke ni ĉiuj estas samideanoj laŭ la sama interna ideo.

Mi samopinias kun la iniciatinto de MEKARO, Normando Fleury, ke ni devas eviti programi debat-sesiojn kaj prelegojn ; ni lasu tion al aliaj kunvenoj, kiuj specialiĝas pri tio. Se ni sukcesis venigi al Kingstono 39 personojn el diversaj lokoj kanadaj kaj usonaj, tio estas pruvo, ke la formulo ja funkcias kaj respondas al vera bezono. Ni daŭrigu sur tiu vojo kaj profitu la okazon por malkovri diversajn interesajn lokojn meze de Kanado. Eble iun tagon ni ankaŭ povos fari la samon ĉe niaj sudaj najbaroj.

# Esperanto en la franca poŝt-servo !

Trefflé (Trefleo) Mercier, Ŝerbruko

*Le document accompagnant l'édition du premier jour d'un timbre émis en France en 1976 en l'honneur de Max Jacob, avait été publié dans plusieurs langues, dont l'espéranto.*


Lastatempe mi spektis televide interesan filmon pri Max Jacob. La rolo de tiu franca verkisto kaj pentristo estis la lasta ludita de Jean-Claude Brially. Post spekti la filmon, kiun mi trovis tre interesa kaj bone farita, mi ekdeziris akiri biografion de Jacob por pli profunde koni tiun historian figuron, kiu famiĝis antaŭ la Dua Mondmilito kaj kiu amikiĝis kun eminentuloj tiel famaj, kiel Pablo Picasso, Matisse, Apollinaire, Modigliani, Jean Cocteau kaj Sacha Guitry.

Mi trovis kelkajn biografiojn kaj mendis ĉe Amazon tiun de Yannick Pelletier publikigitan en 2004.

Dum mia esplorado mi ankaŭ malkovris anoncon pri vendotaj kopioj

de unuataĝaj poŝtmarkoj pri Max Jacob presitaj de la franca poŝta servo. La dokumento vendiĝas en la Unuiĝinta Reĝlando kontraŭ nur 12 usonaj dolaroj kaj enhavas aŭtentikan poŝtmarkon kun portreto farita de Picasso. La poŝtmarko estis publikigita en 1976 okaze de la centjara naskiĝtago de Jacob.

Sed la interesa fakto estas, ke la kartona dokumento havas oficialan tekston en Esperanto ! La franca poŝto eldonis 24 500 ekzemplerojn, inter ili 700 en la germana, 500 en la angla, 600 en la hispana, 550 en la itala kaj 500 en Esperanto ! Mi havas la numeron 20 531 en Esperanto.



# L'espéranto : une langue par choix !

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

*Récemment j'ai été approchée par la rédactrice du site linguistique Sorosoro.org qui m'a demandé d'écrire un article de 500 mots sur l'espéranto. Je l'ai fait, et voici le résultat (l'article était écrit en anglais et a ensuite été traduit en français et en espagnol). Je remercie cordialement tous ceux qui ont laissé des commentaires.*

Quand les gens apprennent que l'espéranto est la langue que j'utilise en famille, on me demande très souvent pourquoi l'espéranto plutôt que ma langue maternelle (le russe), ou celle de mon mari (l'anglais) ? Pour moi comme pour la plupart des locuteurs d'espéranto à travers le monde, l'espéranto est une langue parlée par choix, une langue que nous avons décidé d'apprendre, et qui pour certains d'entre nous a fini par devenir la langue de la famille.

## Pourquoi apprendre l'espéranto ?

Nous sommes tous différents et chacun

a ses propres raisons d'apprendre l'espéranto : certains sont des idéalistes, d'autres se veulent plus pragmatiques, certains sont séduits par l'aspect communication, et d'autres aiment la littérature espéranto, qu'elle soit originale ou traduite.

Pour ma part, j'ai appris l'espéranto par curiosité linguistique, sans trop en connaître la culture. Puis, suite à mon premier séminaire international, organisé par l'Organisation mondiale de la jeunesse espérantophone en Bulgarie voici dix ans, je me suis

The image shows a screenshot of the Sorosoro.org website. At the top, there is a red header with the Sorosoro logo and the tagline "Pour que vivent les langues du monde". Below the header, there is a navigation bar with links for "Les langues dans le monde", "Les langues en danger", "Le programme Sorosoro", "Vos contributions", "FR", and "EN". The main content area features a world map titled "Planisphère des langues" with red highlights indicating language distribution. To the right of the map are social media links for Twitter and Facebook, a search bar, and a newsletter sign-up. Below the map, there are sections for "Vidéos par langue" and "Vidéos de la semaine". The bottom right corner has a "Blog Sorosoro" section with recent posts.

rendu compte que les idéaux espérantistes me parlaient et j'ai commencé à m'impliquer. Trente personnes venues d'une douzaine de pays étaient présentes à ce séminaire. Tout le monde parlait espéranto, et à ma grande joie, j'étais capable de tout comprendre après seulement quelques mois d'apprentissage (même pas intensifs !). D'autres séminaires espérantistes ont suivi puis j'ai passé cinq années à travailler pour une revue espérantiste, une expérience unique grâce à laquelle j'ai pu recueillir des articles du monde entier et ainsi offrir un regard nouveau sur certaines questions sociales, politiques et culturelles.

## **Une autre manière de parcourir le monde**

Certains des espérantistes que je connais ont appris la langue avec l'objectif de voyager. Certains l'ont même apprise avant d'aller faire un tour du monde ! Je viens par exemple de faire la connaissance d'une jeune Américaine, Amanda Higley, qui a suivi trois semaines de cours intensif avant de prendre la direction de l'Europe : le service d'hébergement/logement espéranto Pasporta Servo ([www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)) lui a permis de parcourir plus d'une douzaine de pays...

Il y a quelques années, lors du congrès mondial

d'espéranto en Pologne, j'ai rencontré Bruno et Maryvonne Robineau, un couple français, auteurs de *Et leur vie, c'est la terre / Huit ans de nomadisme autour du monde* : l'espéranto a été la langue-clé de leur voyage, et ainsi, ils ont pu vivre des expériences culturelles qu'ils n'auraient jamais vécues s'ils avaient choisi une manière plus ordinaire de voyager. Ils ont participé à la vie quotidienne dans différents coins du monde, en vivant d'activités de toutes sortes, des rizières coréennes à l'enseignement de l'espéranto en Chine.

## **Le rêve d'un monde sans discrimination linguistique**

Pour beaucoup d'espérantistes aujourd'hui, l'idéalisme reste la motivation principale pour apprendre la Langue Internationale. Ils croient en un monde sans discrimination linguistique, où riches et pauvres auraient le même accès à la communication mondialisée.

À l'évidence, les locuteurs de langues dominantes comme l'anglais ont un énorme avantage sur ceux qui sont obligés de les apprendre. Les organisations internationales ne font rien pour changer cela, elles font d'ailleurs tout pour conserver le *statu quo*. Pour ne citer qu'un exemple, une organisation internationale telle que l'ONU accueille près de



200 États membres, pour seulement six langues officielles ! Quant aux langues de travail de l'organisation, elles ne sont que deux, l'anglais et le français...

Voilà pourquoi nous pensons que l'espéranto contribue à éliminer la discrimination linguistique.

Comme toutes les sociétés, la nôtre n'est pas parfaite, mais elle a aussi beaucoup de choses dont nous sommes fiers : sur près de 125 ans d'histoire de la Langue internationale, la communauté espéranto s'est créé une véritable culture, avec ses propres traditions ; musique, littérature, magazines, radios, Wikipédia, avec environ 150 000 articles, une multitude de sites Internet, et des organisations nationales et internationales (y compris, croyez-le ou non, une administration !).

Pour étudier l'espéranto gratuitement, rendez-vous sur [www.lernu.net](http://www.lernu.net), portail plurilingue d'apprentissage de l'espéranto qui vient d'atteindre le nombre de 100 000 inscrits.

*Yevgeniya (Ĵenja) Amis est née à Kiev, a vécu 5 ans à Atlanta, et réside actuellement à Montréal. Ancienne rédactrice en chef de Kontakto, une revue socio-culturelle espéranto lue dans plus de 90 pays, elle est maintenant activement engagée dans les travaux de l'Esperantic Studies Foundation: [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org).*

## La cimo de l' jaro 2038

*Silvano Auclair*

Ĉu vi memoras la timon, ke komputiloj ĉesos bone funkcii je la 1-a de januaro 2000 ? Pro tio ke jaroj estis reprezentataj per du ciferoj, tiel ke komputiloj konfuzus jaron 2000 kun 1900 ? Nu, ĝi estis evitata per multa antaŭlaboro.

Nu, la komputiloj funkciantaj laŭ la sistemo UNIX, uzata de multaj komputiloj (eĉ en la veturiloj, ekzemple), spertos similan problemon. Ili kalkulas la tempon per la nombro de sekundoj depost la 1-a de januaro 1970. Ĉar ili uzas 32-bitan nombron, kaj ĉar la unua bito (duuma cifero, do 0 aŭ 1) de tiaj nombroj notas la signon (plus aŭ minus), nu, la 19-an de januaro 2038, je 3 h 14 m 07 s (laŭ la universala tempo), tiuj komputiloj kredos, ke estas la 13-a de decembro 1901, t.e. 2 147 483 648 sekundoj antaŭ la starta momento, aŭ 10000000 00000000 00000000 00000000 sekundoj, en duuma sistemo.

Inter la proponitaj solvoj estas tiu eknoti la tempon per 64 bitoj anstataŭ 32. Kompreneble, tio nur prokrastos la momenton, kiam la problemo ekestos. Kiom longe ? Ekzakte ĝis 15 h 30 m 08 s de dimanĉo 4-a de decembro de l' jaro... 292 277 026 596. Devus sufiĉi.

# Ci kaj vi en Esperanto

Francisko Lorrain



*Relativement au pronom espéranto de la deuxième personne du singulier, ci, trois écoles s'affrontent. L'école dominante, suivant en cela Zamenhof lui-même, propose de n'utiliser que vi en toute circonstance. Une seconde école, plus répandue qu'on ne croit, propose d'utiliser ci dans le langage familier et vi dans le langage plus formel (quand on s'adresse à une seule personne). Une troisième école, moins répandue, propose de n'utiliser que ci pour s'adresser à une seule personne, quelles que soient les circonstances.*

**Nia julifina trrivera renkontiĝo, en kiu partoprenis Francisko Gauthier kaj Kamij, kiuj kun firma konvinko ci-diras al ĉiuj, instigis min pli funde esplori la ci-temon. Jen.**

## Ci en la unuaj tempoj de Esperanto

En la *Unua Libro* de Zamenhof (1887), *ci* ne aperas. En la *Fundamento de Esperanto* de Zamenhof (1905), la pronomo *ci* ne aperas inter la famaj dek ses reguloj de la *Fundamenta gramatiko*. En la samloka *Ekzercaro*, tamen, *ci* ja aperas, sed nur duloke, en paragrafo 16 :

Mi legas. — Ci skribas (anstataŭ «ci» oni uzas ordinare «vi»).  
— Li estas knabo kaj ŝi estas knabino. [...]

Kaj, en tiu sama *Fundamento*, la vortoj *ci* kaj *cia* ja staras en la *Universala vortaro*.

La *Fundamenta krestomatia de la lingvo Esperanto* (1a eldono 1903) enhavas la samajn ekzercojn ol la supre citita *Fundamento* (krom la kvar unuaj de ĉi-lastaj kaj la rakonto *La feino*), sed miascie *ci* tute

forestas el la aliaj partoj de la libro, eĉ en ĝiaj pluraj postaj eldonoj.

Tamen, en *Lingvaj respondoj* (kolekto de prilingvaj klarigoj diverstempaj), Zamenhof sufiĉe longe traktas la demandon, en paragrafoj 86 kaj 87 :

- 86 Pri la uzado de «vi» kaj «ci»  
«Vi» ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj ; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li : «vi» aŭ «ci» («ci» signifas la duan personon de l' ununombro ; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole nur en la plena vortaro ; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata). [1888]
- 87 Pri la pronomo «ci»  
La neuzado de «ci» tute ne estas senkonscia imitado de

la ekzistantaj lingvoj, — kontraŭe, ĝi estas specialaĵo de la lingvo Esperanto, specialaĵo bazita sur pure praktikaj konsideroj kaj esploroj. La plej bona maniero, kompreneble, estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus «vi» kaj al unu persono ĉiam «ci»; sed ĉiuj nuntempaj kulturaj popoloj tiel al kutimiĝis al la ideo, ke «ci» enhavas en si ion senrespektan, ke ni neniam povus postuli de la esperantistoj, ke ili al ĉiu unu persono diru «ci»; ni devus sekve havi apartan pronomon de ĝentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878). Sed la praktiko de ĉiuj ekzistantaj lingvoj montris, ke tia «formo de ĝentileco» estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni devas nin turni al tiu aŭ alia persono (ekzemple al infano k.t.p.): «ci» ŝajnas al ni eble ofenda, pronomo de ĝentileco ŝajnas al ni ridinde ceremonia. En tiaj okazoj oni en la ekzistantaj lingvoj uzas diversajn artifikojn, kiuj tamen tre ofte estas tre embarasaj, kiel por la parolanto, tiel por la aŭskultanto (ekzemple anstataŭ «ci» kaj «vi» oni diras «li», «oni»,



La kvakeroj estis la lasta grupo, kiu regule uzis *ci* (thou) en ĉiutaga vivo en la angla pro ilia kredo je egaleco de ĉiuj homoj. Ĉu esperantistoj faru same?

«sinjoro», «fraŭlo» k.t.p.). Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur «vi». Malkompreniĝon tio ĉi neniam povas kaŭzi, ĉar en tre maloftaj okazoj de neklareco ni povas ja precizigi nian parolon, dirante «vi, *sinjoro*», aŭ «vi *ĉiuj*», «vi *ambaŭ*» k.t.p.

Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de «ci» (ekzemple kiam ili sin turnas al Dio aŭ al amata persono), la uzado de «vi» ŝajnas neagraba nur en la *unua tempo* (tiam ili ja havas la rajton uzi «ci»), sed post kelka praktiko oni tiel facile al kutimiĝas al la uzado de «vi», ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion «malvarman». Ĉio dependas ja nur de la *kutimo*. [1908]

Tio indikas, ke la demando pri *ci* estis jam tiutempe diskutata. Samloke sekvas kelkaj interesaj paragrafoj pri la pronomoj *li*, *ŝi* kaj *ĝi*, sed tio kondukus nin ekster nian temon.

## **Ci en postaj jaroj**

Ni esploru nun kelkajn konatajn kaj ĝenerale fidindajn vortarojn kaj gramatikojn aperintajn poste, kiam Esperanto jam fariĝis matura lingvo. Ĉiuj tiuj verkoj agnoskas la fundamentecon de *ci*, sed ili iomete

malsame, kaj miasente ne tute komplete, prezentas ties uzadon.

1. En la supre citita paragrafo 86, Zamenhof aludas pri la «plena vortaro». La dua eldono de la samnoma *Plena vortaro de Esperanto* (1a eld. 1930) prezentas la pronomon *ci* kiel fundamentan, kun la sekva difino:

**1** Pronomo de la dua persono en ununombro, uzata por alparoli iun sencere monie. **2** Kelkfoje alparolante al Dio. [El la 2a eld. 1934.]

Kaj pri *vi* (en la sama eldono):

**1** Pronomo de dua persono en pluralo. **2** Ĝentila formo, uzata anstataŭ *ci* por dua persono en singularo.

Laŭ tiu vortaro, *ci* kaj *vi* estus uzataj kiel *tu* kaj *vous* en la franca ! Ĝi ne mencias — eble pro ideologia kialo —, ke tia uzado minoritatas en Esperantujo. Sed la sekvaj du vortaroj prezentas malsaman bildon pri la uzado de tiuj pronomoj.

2. En *Grand dictionnaire esperanto-français* de G. Waringhien, 3a eldono (1994), staras, pri *ci* :

(pron.) toi, tu (ne s'emploie qu'en traduction, et pour rendre un effet littéraire)

Same en la unua eldono, de 1957.

3. Ankaŭ *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (2002) prezentas la pronomon *ci* kiel fundamentan, sed kun la sekva difino:

Pron. uzebla por nomi la alparolaton. Rim. Laŭ la konsilo de Z. («diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur "vi"» [vd. la supre cititan paragrafon 87]), **ci** estas tre malofte uzata ; ĝin kutime anstataŭas **vi** : *post paso de monato ŝanĝiĝis «Vi» per «ci»* [citaĵo de F. Zamenhof] ; *mi tra feliĉa ploro diradas al vi : Ci !* [citaĵo de B. Vaha].

Notu, ke ĉi tiuj tri vortaroj estis eldonitaj aŭ de SAT (Sennacieca asocio tutmonda) aŭ de SAT-Amikaro, ambaŭ maldekstremaj organizaĵoj. Sed ni esploru nun du gramatikojn.

4. En *Plena gramatiko de Esperanto*, 3a eldono (1958), G. Waringhien kaj K. Kalocsay traktas la pronomon *ci* nur (miascie) en la sekva rimarko, fine de paragrafo 45 :

Ekzistas en la Fundamenta Vortaro aparta pronomo por la dua persono singulara : *ci, cin, je ci*. Sed «en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata» (Zamenhof, «Dua Libro») ; oni trovas ĝin kelkfoje en poezio, por traduki nacilingvan nuancon, kaj en la esprimo : *ci-diru al iu*.

5. En *Plena manlibro de Esperanta gramatiko* (2005), B. Wennergren skribis, en paragrafo 11.4 :

## Ci

*Ci* estas unu-nombra alparola pronomo (kiu tute ne montras sekson). *Ci* kaj *cia* ekzistas nur teorie, kaj estas preskaŭ neniam praktike uzataj. Eblus imagi *ci* kiel pure unu-nombran *vi*, aŭ kiel intiman familieran (unu-nombran) *vi*, aŭ eĉ kiel insultan (unu-nombran) *vi*. Sed estas fakte tute neeble diri, kian nuancon ĝi montras, ĉar ĝi apenaŭ estas uzata:

**Ci** skribas (anstataŭ «**ci**» oni uzas ordinare «*vi*»).<sup>FE.16</sup> Tio ĉi estas la sola frazo kun *ci* en la *Fundamenta Ekzercaro*.

Krome, *ci* kaj *cia* estas menciitaj

en la *Universala Vortaro* de

la *Fundamento*, sed en

la *Fundamenta Gramatiko* («la

16 reguloj») aperas

nek *ci* nek *cia*. Ankaŭ en

la *Unua Libro* ili ne troviĝas.

Iuj imagas, ke oni antaŭe

uzis *ci* en Esperanto, kaj ke tiu

uzo poste malaperis, sed fakte *ci* neniam vere estis praktike

uzata. Ĝi nur aperis iafoje en eksperimenta lingvaĵo k.s. En

normala Esperanto oni ĉiam uzadis nur *vi*.

Kelkfoje oni trovas *ci* en tradukoj, kie la originalo havas *ci*-similan pronomon. Tio plej ofte estas netaŭga tradukomaniero, ĉar *ci* apenaŭ kapablas redoni la sencon de ofte uzata normala vorto, kiam ĝi mem estas maloftega preskaŭ sensenca vorto. Por montri ekz. nuancon de familiareco aŭ insultan sencon, oni uzu je bezono aliajn lingvaj rimedojn:

«*Jes, jes !*» *diris la reĝo*, «*lunde ci ricevos nian filinon !*» ĉar nun, kiel al estonta bofilo, li parolis al li «**ci**».<sup>FA1.130</sup> [El la *Fabeloj de Andersen*, esperantigitaj de Zamenhof.] En la originala

teksto aperis *ci*-simila pronomo, kiu montris intiman, familieran rilaton. Oni povus alternative traduki ekz.

jene : «*Jes, jes !*» *diris la reĝo*, «*lunde, kara filo, vi ricevos nian filinon !*», ĉar nun, kiel estontan bofilon, li nomis lin «*filo*».

Tre multaj esperantistoj ne komprenas la pronomon *ci*. Tial tiuj, kiuj provas uzi *ci* en interparolado, renkontas multajn malfacilaĵojn. En normala Esperanto oni simple uzas

ĉiam *vi*, ĉu oni parolas al unu persono, ĉu

al pluraj, ĉu oni parolas al intime konata

persono, ĉu al fremdulo, ĉu oni parolas

al amiko, ĉu al malamiko. Tio funkcias tre

bone. Je bezono oni povas pliprecizigi

per *vi sinjoro*, *vi amiko*, *vi kara*, *vi ĉiuj*, *vi*

*amikoj*, *vi karaj*, *vi ambaŭ* k.t.p.

La kunmetaĵo *ci-diri* (aŭ *ci*) povas

iafoje montri uzadon de *ci*-simila pronomo en alilingva

interparolo : — *Kial ŝi ofendiĝis ? Mi ne komprenas ilian*

*lingvon*. — *Mi pensas, ke li ci-diris al ŝi, kaj tion ŝi ne permesas*.

**Tre multaj esperantistoj ne komprenas la pronomon *ci*. Tial tiuj, kiuj provas uzi *ci* en interparolado, renkontas multajn malfacilaĵojn**

Tamen, malgraŭ la unuanimeco de la supraj citaĵoj 2 ĝis 5 kaj ilia kongruenco kun la sinteno de Zamenhof, la demando pri *ci* estas daŭre disputata en Esperantujo. Mi jam priskribis, en antaŭa numero de *La Riverego* (n-ro 101, septembro 2010), la efektivan uzadon de *ci* : ĉi tiu pronomo estas ja pli ofte uzata, en iuj Esperantaj medioj, ol agnoskas la

fontoj 2–5. Sed mi volas ĉi tie esplori la aferon el alia vidpunkto, pli teoria. Estas tri skoloj, kiujn mi nomos la nur-*vi*-skolo, la *ci*-aŭ-*vi*-skolo kaj la nur-*ci*-skolo.

### La nur-*vi*-skolo

Inter la tri skoloj, ĝi estas delonge la plej disvastigita. Ĝi sekvas la konsilon de Zamenhof : «diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur *vi*.»

Same estas en la angla : nun oni maloftege uzas «Thou» por alparoli Dion, kaj ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur kvakeroj daŭre uzis «thou» inter si, sed laŭdire nun eĉ ili rezignis pri tiu pronomo.

**Avantaĝo** : simpleco — rilate alparolajn pronomojn, ĉiuj homoj, bestoj kaj aĵoj egalas.

**Malavantaĝo** : se oni ne atentis, povas estiĝi konfuzo inter la ununombra *vi* kaj la multnombra *vi*.

### La *ci*-aŭ-*vi*-skolo

Ĝi estas la dua plej disvastigita skolo. La supraj citaĵoj 1 el la *Plena vortaro de Esperanto* esprimas tre simple, sed plene, la pozicion de tiu skolo.

En multegaj eŭropaj lingvoj oni povas alparoli iun per du aŭ tri malsamaj pronomoj aŭ pronomecaj esprimoj. France : *tu* kaj *vous*.

Germane : *du* kaj *Sie* (3a-persona pronomo multnombra). Hispane : *tu* kaj *Usted* (3a-persona

pronomo). Itale : *tu* kaj *Lei* (3a-persona pronomo). Katalune : *tu, vós, vostè* (3a-persona pronomo). Portugale : *tu, você* (3a-persona pronomo), *o senhor / a senhora* (3a-persona pronomeca esprimo). En pluraj el tiuj lingvoj, same estas, kiam oni alparolas samtempe du homojn aŭ pli. Germane : *ih* kaj *Sie*. Hispane : *vosotros* kaj *Ustedes* (en Hispanujo). Katalune : *vosaltres, vostès*. Itale : *voi* kaj *Loro*. Portugale : *vós, vocês, os senhores / as senhoras*. En Esperanto, tamen, estas nur unu alparola multnombra pronomo : *vi*. Iuj proponis anstataŭigi ĉi-lastan per la multnombraj pronomoj *cij* kaj *vij*. Kial ne ?

Same, en multaj neeŭropaj lingvoj, kiel, ekzemple, en la japana, oni uzas malsamajn pronomojn aŭ verbajn formojn laŭ la sekso, rango, socia pozicio de la alparolata(j) homo(j) kaj onia rilato al tiu(j).

La uzado de tiaj lingvaj formoj tamen ege varias — laŭ la lingvo, lando, socia klaso, medio, regiono, familio, kaj eĉ laŭ la cirkonstancoj. En la franca, ekzemple, *tu* povas foje esprimi malestimon, foje amon kaj proksimecon, foje egalecon, foje malegalecon ; same *vous* povas esprimi malestimon aŭ estimon, egalecon (inter nekonatuloj) aŭ malegalecon ; kaj ĉio tio kun multaj nuancoj. La *ci*-aŭ-*vi*-skolo ja minoritatas, sed daŭre vivas, en kelkaj Esperantaj medioj. La anoj de tiu skolo argumentas jene : ĉar *ci* jam ekzistas en la fundamenta Esperanto, kaj jam havas daŭran (kvankam minoritatan) tradicion kaj en la parolata kaj en la

skribata lingvo, ni uzu ĝin senĝene, kiel aldona esprimrimedo.

**Avantaĝoj.** (a) Tio faciligas la tradukadon de verkoj el lingvoj, kiel tiuj supre menciitaj. (b) Tio permesas rekte esprimi en Esperanto nuancojn oftajn en pluraj gravaj lingvoj.

**Malavantaĝoj.** (a) Kiel jam dirite, la uzadnormoj de *ci* kaj *vi* (aŭ similaj pronomoj) tiom varias, ke ne ekzistas klara normo pri la internacia uzado de tiuj pronomoj en Esperanto. Se francoj interparolas Esperante, tio malofte estigos problemon. Mi ne scias, sed, se (ekzemple) rusoj interparolas Esperante kun hispanoj (temas pri nura hazarda ekzemplo), povus esti, ke en certaj cirkonstancoj la malsama uzado de *ci* kaj *vi* okazigus miskomprenojn, eĉ malagrablajn. (b) La uzado de eksplicita gramatikaĵo povanta esprimi malegalecon, hierarkion iusence kontraŭas la internan ideon de Esperanto.

### La nur-*ci*-skolo

Tiu ĉi skolo estas ankoraŭ pli minoritata, sed tamen laŭ mi gravas. Ĝia devizo estas «diri al ĉiu kaj ĉio nur *ci*.» Nur-*ci*-anoj kritikas la nur-*vi*-skolon pro tio, ke *vi* ambiguas, estante kaj ununombra kaj multnombra, kaj supozeble ankaŭ pro tio, ke *vi* estus por ili tro formala alparolmaniero (almenaŭ por parolantoj de lingvoj, en kiuj ekzistas viumado). Kaj

ili kontraŭas la *ci*-aŭ-*vi*-skolon pro ties malunuforma maniero alparoli homojn, ja certgrade kontraŭa al la ideo de universala frateco.

Mi konas nur du lingvojn, en kiuj ne ekzistas viumado, sed nur ciumado : la latina (ununombra *tu* kaj multnombra *vos*) kaj la islanda (ununombra *þú* [thu] kaj multnombra *þið* [thidh]). Antaŭe viumado ekzistis en la islanda, sed ĝi malaperis. Mi certas, ke ekzistas multaj aliaj lingvoj sen viumado.

**Avantaĝoj.** (a) simpleco : rilate alparolajn pronomojn, ĉiuj homoj, bestoj kaj aĵoj egalas ; (b) malambigueco : *ci* estas nur ununombra, *vi* nur plurnombra.

**Malavantaĝoj.** Ĉar en Esperantujo la *ci*-aŭ-*vi*-skolo estas multe pli konata ol la nur-*ci*-skolo, nur-*ci*-ano riskas renkonti la sekvan problemon en siaj rilatoj kun aliskolaj esperantistoj : kiam li/ŝi alparolas iun per *ci*, la alparolato povus, en iuj okazoj, interpreti tiun *ci*-on kiel esprimon de proksimeco aŭ de malrespekto, eĉ se tion tute ne intencas la alparolanto. Kaj se la nur-*ci*-ano uzas *vi*-on, povas esti, ke la alparolantoj ne scios, ĉu li alparolas nur unu, aŭ male kelkaj el ili. Tamen, mi supozas, ke konvinkita nur-*ci*-ano tute ne zorgos pri tiaj konsekvencoj, aŭ simple ĉiam pacience klarigos al la alparolato(j) sian uzadon de *ci* kaj *vi*.

## Socio kaj lingvo

Estas fakto, ke socio kun nur-*ci*-lingvo povas esti ege malegaleca (kiel estis la romia imperio), aŭ nur mezgrade malegaleca (kiel estas Islando). Ĉiu lingvo havas sufiĉajn esprimrimedojn por esprimi rekte aŭ malrekte ĉiujn homrilatajn nuancojn. Same socioj kun nur-*vi*-lingvo, kiel la angla, neniel estas egalecaj.

Inverse, socio kun *ci*-aŭ-*vi*-lingvo povus esti tre egaleca. Fakte, en *ci*-aŭ-*vi*-socio, *vi* ĝenerale esprimas pli distancon inter la alparolanto kaj alparolato, ol la superecon de la alparolato. En tiaj socioj (kiel ekzemple en Kebekio kaj Francujo) la uzado de *tu* kaj *vous* inter du homoj estas plej ofte simetria : aŭ ambaŭ sin ciumas, aŭ ambaŭ sin viumas.

En la franca, oni malofte uzas *tu*-on kaj *vous*-on malsimetrie. Laŭ mia impresoj, niaepoke tio okazas nur inter instruistoj kaj studentoj je la mezgrada nivelo (Secondaire, CEGEP), kaj eble ankaŭ iom inter profesoroj kaj studentoj en la universitato. En la bazlernejo oni ĝenerale uzas *tu*-on simetrie, en la universitato ofte *vous*-on simetrie. Ĉu tiu malsimetrio esprimas malegalecon ? Certe. Sed ne sociklasan malegalecon. Laŭ mi estas nenio malbona en tio. Eĉ sen tia malsimetria alparolmaniero, tamen estus inter la pli aĝaj instruantoj kaj malpli aĝaj instruatoj malsimetria kondutoj.

## Apliki kaj defendi sian ideon

Antaŭ ol publikigi la *Unuan Libron*, dum li disvolvis sian lingvon, Zamenhof ĉiam provis ĝin, verkante en ĝi diversajn tekstojn, ĉu originalajn, ĉu tradukajn. Nur tiel li povis alveni, iom post iom, al kontentigaj, bone funkciantaj formoj. Kaj, post la *Unua Libro*, li daŭrigis tiun provprocezon, multe verkante kaj tradukante, tiel pluevoluigante Esperanton. Kaj same faris niaj unuaj grandaj tradukistoj, kiel Antoni Grabowski kaj Kazimierz Bein (la fama «Kabe»).

Dum la tuta historio de Esperanto, multaj homoj proponis ŝanĝojn en la lingvo, aŭ en la maniero uzi la lingvon, sed malmultaj el ili vere klopodis pravigi sian koncepton per efektiva uzado en longaj tekstoj, kiel romanoj, poemaroj, k.t.p. Faris tion Karolo Piĉ (interalie en sia romano *La litomiŝla tombejo*, 1981) kaj kelkaj aliaj, kiel Christian Declerck (interalie en la romano *Spitaj kiel hidrargo*, 2008) kaj Eugène de Zilah (interalie en la romano *La princo ĉe la hunoj*, 2011). Ĝis nun mankas al la nur-*ci*-skolo, same kiel al la riisma skolo, aŭ aliaj similaj skoloj, tiaj imponaj verkoj. Ideo ŝajne bona ne sufiĉas : ĝia praveco devas esti pruvata per efektiva uzado en kreaĵoj substantcaj. Mi nur povas esperi, ke la proponantoj de tiaj ideoj ne nur paciencas kaj daŭre defendos ilin, sed krome aplikos ilin en konvinkaj kaj interesaj libroj.



## Lingwa de Planeta, ĉu hodiaŭa Esperanto ?

*Silvano La Lacerto Auclair*



*Si l'esperanto avait été inventé non en 1887, mais en 2011, il aurait sûrement été assez différent de l'esperanto que nous connaissons. Cet esperanto de 2011 aurait peut-être ressemblé à la « Lingwa de Planeta », aussi connue sous le nom abrégé de « lidepla », qui, entre autres particularités, tire une partie importante de son vocabulaire de langues non-européennes.*

Homoj interesiĝantaj pri la socia historio de lingvoj tuj povas rimarki, en kiu epoko Esperanto estis kreita. Ili ne nur rekonos latinajn (*sed, tamen*), kvazaŭlatinajn (*kvankam, aŭ*) kaj grekajn (*kaj*) vortojn, sed la ekziston de gramatikaj kazoj (eĉ se nur du), reguloj kiel akordo inter substantivoj kaj adjektivoj, la preciza gramatiko kaj la regado de la franca en la vortaro certe kaj prave direktos ilin al la koncerna epoko : fino de la 19-a jarcento aŭ komenco de la 20-a.

Cetere, ili povus ankaŭ eltrovi el la prononco, ke Esperanto estis kreita ie en Slavio...

Se iu volus simile, sed nuntempe, krei internacian lingvon, kia ĝi estus ? Certe en la vortaro malpli gravus la franca, la latina kaj la greka, sed pli la angla kaj ekstereŭropaj lingvoj ; ĝi ne havus kazojn, kaj, pli ĝenerale, ĝi kontentiĝus per malpli precizaj

gramatikaj iloj ; ĝi estus fonetike pli respektema al diversaj popoloj. Ĉu ekzistas tia lingvo ? Jes. Ĝi nomiĝas Lingwa de Planeta.

### Lingwa de Planeta

Lingwa de Planeta (traduki tiun nomon oni ne vere bezonas, krom en tio, ke en la lingvo ne ekzistas artikolo) estas juna, sed populariĝanta kreaĵo de du rusoj de Sankt-Peterburgo, Dmitrij Ivanov kaj Anastasia Lysenko. Kiel multaj internaciaj lingvoj, ĝi prenas siajn vortojn el pluraj lingvoj, havas simplan kaj regulan gramatikon, havas rimedojn por fari, ekzemple, verbon aŭ adjektivon el substantivo, kaj celas unuecon de la homaro : ĝia slogano estas *Fo unitaa de Arda* — por la unueco de la Tero.



Le vortoj de lidepla (mallongigo) venas ĉefe el eŭropaj lingvoj, sed kelkaj oftaj vortoj venas ankaŭ el la araba, la hindia aŭ la ĉina. Tio ne nur donas

al la lingvo pli da internacieco, en iu senco, sed ankaŭ ebligas respekti la tre simplan fonetikon de la lingvo. Nu, LdP (alia mallongigo...) posedas nur 22 sonojn : la kutimajn kvin vokalojn kaj nur 17 konsonantojn. Krome, ne devas esti necese distingi inter J (= ĝ) kaj ch (= ĉ). V kaj W havas la saman sonon (= ŭ), kaj ne gravas ĉu S donas la sonon Z aŭ S. Fine, por certigi klaran komprenon fare de ĉiuj popoloj, la distingo inter P/B, T/D kaj K/G ne nur konsistas el voĉeco, kiel en la franca, sed ankaŭ en tio, ke P, T kaj K estas aspiraciaj (en IFA : p<sup>h</sup>, t<sup>h</sup> kaj k<sup>h</sup>), kiel en la ĉina kaj iom en la angla.

Nu, pro la diversa deveno de la vortoj, oni povas krei frazojn, kiuj tre similas la rusan : *yu snova dumai om sey nove filma* (vi denove pensas pri tiu nova filmo), la ĉinan : *ta shwo ke ta bu yao chi yan, ta yao nangwa* (li diras, ke li ne volas manĝi ŝafajon, li volas kukurbon), la hindian : *me jan ke mata pri pi chay* (mi scias, ke la patrino ŝatas trinki teon) aŭ la araban : *juma<sup>1</sup> sabah me safari* (sabaton matene mi vojaĝos).

## Gramatiko


La gramatiko de LdP estas tre simpla, sed, anstataŭ uzi multajn finaĵojn, ekzemple, por verbaj modoj kaj

tempoj, ĝi prefere uzas helpvortojn. Ekzemple, oni markas la futuron per la vorteto *ve*, la kondicionalon per *wud*, la paseon per *he* aŭ per la sufikso *-te* (**kun** la liga streketo). Por *ĵus*, oni uzas la vorton *yus*, kaj *sal* por *tuj*.

Ĉar la vortoj estas plej ofte tre mallongaj (*pri* estas ŝati, *chi* estas manĝi, *flai* estas flugi, *yao<sup>2</sup>* estas deziri, kaj *vidi, audi, fini* kaj *sidi* signifas same kiel en Esperanto), la rezulto ofte estas senfina aro da mallongaj vortojn, kion oni povas trovi bela aŭ ne.

Kategorion de vortoj ne indikas nevariaj finaĵoj, kiel en nia lingvo. Substantivoj povas finiĝi per *-a* aŭ konsonantoj, aŭ eĉ, sed malofte, alia vokalo. Adjektivoj kutime finiĝas per *-e* (kiel *forte*, *forta*), sed derivitaj adjektivoj finiĝas per *-ney* (kiel *sekret-ney*, *sekreta*), kaj estas esceptoj : inter aliaj, *blan* signifas blanka, *hao* signifas bona (el ĉina deveno) kaj *muhim* signifas grava (el la araba). Krom tio, estas adjektivigaj finaĵoj, kiel en *joisaful*, ĝojplena, aŭ *ginalik*, virineca.

La deriva sistemo estas, laŭ mi, iom ajna. Sufikso *-ney* kutime kreas adjektivojn el substantivoj, sed oni kreas *kordiale* el *kordia* (koro), kaj *harmonike* el *harmonia*. Kial ? Mi ne scias.



La akcento regule falas antaŭ la lasta konsonanto, krom por kelkaj malmultaj finaĵoj. Neregulan akcenton oni markas per duobla vokalo, kiel en *unitaa*, *unueco*, *malgree*, *malgraŭ*, aŭ *bifoo*, antaŭ.

## Klaro kaj sufiĉo

Esperantistoj foje alvokas la principon de *klaro kaj sufiĉo* por klarigi kelkajn lingvajn regulojn aŭ uzojn. Nu, LdP iras multe pli antaŭen en tiu direkto. Pluraloj ne estas devigaj, kaj tute ne estas akceptataj se estas nombro : *pet jen*, kvin homoj (fakte : kvin homo). Same, uzo de vorteto por paseo aŭ futuro ne estas necesa se estas alia tempindiko : *aftemanya me go fishi* : postmorgaŭ mi iros (fakte : iras) fiŝi.

Tiu emo al simpla esprimo ankaŭ konkretiĝas en la verbo *fai*. Tiu verbo ne havas propran sencon (iel kiel la Esperanta prepozicio *je*), sed simple asertas, ke estas plenumata la normala ago aludita de la komplemento. Ĝi iom similas la verbon *fari*, sed kun pli larĝa uzo. Ekzemple : *me fai kwesta*, mi metas demandon ; *yu fai kitaba*, vi legas libron ; *lu fai kino*, li spektas filmon, li ĉeestas en kinejo ; *ela fai kama*, ŝi iras al lito, ŝi iras dormi.

Simila estas la esprimo de sekso. Ekzistas en lidepla **kvar** singularaj triapersonaj pronomoj : *it*, *ĝi* ; *lu*, *li* ; *ela*, *ŝi* ; kaj *ta*, *li* aŭ *ŝi*. Tre eleganta solvo al problemo, kiu delonge frapadas Esperanton. Por substantivoj,

estas simile. Ĉiuj nomoj estas baze neŭtraj ; por indiki sekson, oni aŭ antaŭmetas *gin-* aŭ *man-* (virino — viro), kun la liga streketo, aŭ aldonas finaĵon *o* por virigi kaj *ina* por inigi : *rega* — reĝo aŭ reĝino ; *rego* — reĝo ; *regina* — reĝino. Komprenble, indiko de sekso okazos nur kiam *necesas*.

Nu, ekzistas ankaŭ kelkaj vortoj malsimilaj laŭ la sekso : *mata/patra*, *oma/opa* (avino/avo), *docha/son*, *tia/onkla*, *sista/brata*, *madam/sinior*, *gela/boy*, *gina/man*.

## Vortfarado

Ĉu paroli pri vortfarado ? Nu, ne estas multo por diri pri ĝi. Lingwa de Planeta funkcias iom kiel Esperanto, kun sufiksoj, prefiksoj kaj vortkunmetoj. Pluraj el tiuj afiksoj similas tiujn de Esperanto. Ni listigu *ek-* (ŝajne el la hindia...), *fuy-* (fi), *kontra-*, *mis-*, *pra-*, *tra-*. La sufiksoj por -igi kaj iĝi estas *-isi* kaj *-ifi*, sed estas ankaŭ prefiksoj *fa-* kaj *mah-*. Alia mistero. Sufiksoj -eg- kaj -et- estas tradukitaj per *gro-* kaj *-ki*. (Kaj la aŭtoroj de LdP fieras pri tio, ke tiaj vortoj reprenas universalan vokalan simbolecon, laŭ kiu a kaj o signifas ion grandan aŭ foran, i, ion malgrandan aŭ proksiman.) La sufikso *-ki* ankaŭ uziĝas por krei infanan karesnomon, sed por plenaĝuloj oni simple finu la nomon per *i* : Dimitri -> Dimi ; Oxana -> Oxi.

Du amuzaj sufiksoj, kiujn eblas traduki per -ano aŭ -ulo : la rusa -nik, kiel en *sindomnik*, senhejmlulo,

*novnik*, novulo ; kaj *-jen*, el la ĉina 人, *rén* laŭ latinlitera transskribo, kiel en *auslandajen*, eksterlandano, *jadujen*, sorĉisto, aŭ *Suomi-jen*, Finnlandano.

Prepozicioj estas pli-malpli ordinaraj, sed, fi ! lidepla posedas tiun damnan prepozicion, kiun (nerusaj) Esperantistoj tre ofte misuzas : po ! Bonŝance, estas ankaŭ prepozicio *per* por divido : po cent gramoj por kilo : *sto gram per kilo*. Fu !

## La komenca dediĉo de La Eta Princo : Syao Prinsa

A Léon Werth

Me he dediki sey kitaba a un adulte jen. Bat me gro-pregi kindas om ke li pardoni to a me. Sey adulte jen es zuy hao amiga ke me hev in munda. Lu mog samaji olo, iven kindakitaba. Lu jivi in Frans. Lu senti hunga e lengitaa. Lu gro-nidi gei konsoli. Mogbi se olo bu haishi skusi me... Dan me mog dediki sey kitaba a kinda ke sey adulte jen bin bifooen. Oli adulte jen ya un-nem bin kinda (obwol shao de li remembi om to). Also me korektisi may dedika:

A Léon Werth, wen lu bin syao boy

## Internacieco

Por nomoj de landoj kaj de lingvoj, LdP decidis ne decidi. Jen kelkaj landoj : *Espania*, *Jungwo*, *Doichland*, *Frans* ; kaj adjektivoj : *ruski*, *inglish*, *portuges*, *ukrainska*, *nihon*. Nu, LdP ricevas vortojn el tre multaj lingvoj ; kial ĝi ne ricevu tiujn vortojn el la koncernaj lingvoj, kiel eble neŝanĝitajn ?

Por saluti, ja estas pure lideplaj vortoj, kiel *hao dey* por bonan tagon, sed kial ne, ankaŭ en tiu kazo, agi kiel eble plej internacie ? Tiel, en LdP, vi povas saluti per jenaj vortoj : *Namastee*, *salam*, *marhaba*, *heloo*, *ola*, *hay*, *nihao*, *chao*, *sdrastvuy(te)*, *sdraste*, *privet*, *haloo*, *salve*, *salut kaj salud* ! Nur mankas *saluuton* !

## Konkludo

Mi ne tro scias, kion pensi pri LdP. Ĝi foje aspektas, kiel sengramatika piĝino, kiel malbela sinsekvo de silaboj, kiel hazarda kaj ĥaosa kunmeto de diversaj vortoj, sed mi devas konfesi, ke ĝi ŝajne funkcias. Ekzistas videaj lecionoj kaj subtitolitaj rakontoj (videblaj ĉe YouTube). Ĝia pli granda internacieco kaj nuntempeco eble estiĝos danĝera por Esperanto, eĉ !

1. Strange, la vortaro donas *petdi*, el nombro *pet*, kvin, anstataŭ *juma por vendredo*.
2. Multaj verboj finiĝas per *-i*, sed ne ĉiuj.

anglalingva retejo : <http://lingwadeplaneta.info/en/index.shtml>  
dialogoj en Esperanto kaj LdP :  
<http://lingwadeplaneta.info/files/eodialog.htm>



## Nova ondo da enmigrantoj : Esperantistaj !

*Cinq espérantophones ont déménagé à Montréal en 6 mois. Ce qui est plus intéressant est que tous les cinq sont venus de pays anglophones !*

Mi kaj mia edzo, Joel, translokiĝis al Montrealo de Atlanto antaŭ iom malpli ol unu jaro : en aŭtuno 2010. Sed ni ne longe restis la « novuloj » : imagu nian surprizon (kaj ĝojon!), kiam jam vintre al Montrealo translokiĝis alia paro el Usono : niaj amikoj Den Drown kaj Carlos Gonzalez. Sed ankaŭ ili ne longe restis la novuloj : ĉi-printempe al Montrealo translokiĝis plia esperantisto el anglalingva lando : Martin Morris el Britio. Revenante post kunveno en Montreala Esperanto-Domo ni ŝercis, ke temas pri « nova ondo de esperantaj enmigrantoj », kaj eble ni kunlaboru kun la kebekia registaro por varbi kvalifikitajn enmigrantojn per anoncoj en esperantlingvaj revuoj. Nu, mi ne povis maltrafi la okazon intervjui la novajn enmigrantojn, kaj ankaŭ fari etan personan sinprezenton. Ni komencu per mia edzo kaj mi, kaj mi invitas Denon, Karlon kaj Martenon rakonti pri si en la venontaj numeroj de *La Riverego*.



### Rakontu pri vi iomete !

*Joel Amis kaj Ĵenja Amis :*

Ĵenja : Mi esperantistiĝis en Kievo (Ukrainio), de kie mi venas originale, kaj mi aktivas en la E-movado jam dekon da jaroj. Mia unua lingvo estas la rusa, kaj kiel ĉiuj esperantistoj, mi amas lingvojn kaj parolas kelkajn. Mi diplomiĝis pri ĵurnalismo kaj laboris kiel ĵurnalisto kaj redaktoro antaŭ mia

translokiĝo al Usono antaŭ ses jaroj. En Usono mi tute ŝanĝis la karieron kaj okupiĝis pri datumbaza marketingo kaj daten-analizo en la Usona Ruĝa Kruco (ĉar laboroj kiel redaktoro en la rusa kaj ukraina ne tre abundas en Ameriko). Por la momento mi havas « superviv-laboron » kiel administranto kaj datenenigisto, sed mi

esperas trovi laboron kiel marketinga analizisto aŭ io rilata al la lingvoj.

Joel : Mi malkovris kaj eklernis Esperanton en

1994 en Georgio, Usono (de kie mi venas), kaj mi aktivas en la Esperanto-movado diversloke kaj diversmaniere (en Nord-Ameriko, Eŭropo kaj Japanio ; kadre de UEA/TEJO, Esperanto-USA kaj plej lastatempe ESK) preskaŭ ekde la komenco (kun escepto de la du komencaj jaroj de mia esperantisteco, kiujn mi pasigis kiel izolito).

Profesie, mi nuntempe laboras parttempe kiel administranto por Esperantic Studies Foundation (ESF – [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)) kaj samtempe studas historion (por magistriĝi) en UQAM.

Ĵenja: Por Joel kaj mi, Esperanto estas nia ĉiutaga lingvo. Ni fakte konatiĝis dank' al Esperanto : ni ambaŭ kandidatiĝis por la posteno de *Kontakto*-redaktoro, do, ni, fakte, konkurencis por la sama laboro ! Kiel rezulto, tiu « feroĉa » konkurenco rezultis en sukcesa kunlaboro (ĉar, gajninte la postenon, mi petis lin kunlabori), kaj poste feliĉa geedzeco !

### **Kial vi elektis elmigri el via lando ? Kial vi elektis Kanadon ĝenerale kaj Montrealon specife?**

Ĵenja : Tie ĉi, en Kanado, ni devas ofte klarigi, kial ni elmigris el Usono, kiu estas laŭ la ideo de pluraj homoj, « la plej bona lando en la mondo ». Nu...

estis pluraj kialoj : politikaj, ekonomiaj, personaj. Bedaŭrinde, la politiko en Usono ĉiam pli dekstriĝas, kaj aparte en Georgio, kie ni loĝis... Kaj krome, ĉar ni ne ŝoforas, kaj la senaŭta vivo en Atlanto (kaj preskaŭ ĉie en Usono, kie la tuta infrastrukturo estis farita ĉirkaŭ la aŭto) estis tre malfacila. Ekzemple, mia veturado al la laborejo estis granda aventuro : mi devis preni la buson, tiam du trajnojn, kaj tiam kunveturi 20 minutojn aŭte, ĉar nenie apud mia oficejo estis publika transporto ! Tio, fakte, eĉ tre malsanigis min kaj mi komprenis, ke tia vivo ne povas daŭri.

Krome, translokiĝi ĝuste al Kebekio kaj lerni la francan estis tre interesa aventuro !

Joel : Alia konkreta avantaĝo de Montrealo estas abundeco de universitatoj. Ĉi tio gravas por mi, ĉar mi volas daŭrigi miajn studojn.

### **Ĉu vi konis Montrealon antaŭ ol vi decidis elmigri ?**

Ĵenja : mi vizitis ĝin dum TAKE en 2008 kaj tre ŝatis la urbon !

Joel : Mi vizitis Montrealon kun Ĵenja por TAKE kompreneble, sed mia unua vizito estis en 1998 por NAKE (Nord-Amerika Kongreso de Esperanto

— komuna aranĝo inter ELNA [t.e. Esperanto-USA], KEA kaj ESK). Efektive, tiu vojaĝo estis tuta aro de unuaj spertoj por mi : mia unua vojaĝo sen mia familio, mia unua aviadila veturo, mia unua eliro el Usono kaj mia unua Esperanto-kongreso ! Montrealo tiam tre pozitive impresis min, kaj mi imagis, ke mi povus bone vivi ĉi tie — sed mi ne aŭdacis imagi, ke tio iam realiĝos!

### **Ĉu Esperantaj aktivajoj estis decida aŭ influa faktoro en via decido elmigri ?**

Ĵenja : Ni jam konis Normandon kaj Zdravka-n, kaj kiam ni konsideris diversajn urbojn, la aktiva Esperanta vivo ja estis unu el la grandaj plusoj por Montrealo.

Joel : Kompreneble forta (aŭ, minimume, ekzistanta) loka movado estis grava kriterio por ni. Kaj, aparte pro miaj personaj spertoj, Montrealo estis forte ligita en mia menso kun vigla Esperanto-komunumo.

### **Kiel diferencas E-aktivajoj en Montrealo de E-aktivajoj en via urbo/regiono ?**

Ĵenja : Kvankam Normando (prave) rimarkis en la antaŭa numero de *La Riverego*, ke la Esperanto-

movado en Kebekio « dormetas », ĝi tamen estas multe pli vigla kompare kun tiu de Usono (nu, almenaŭ en nia antaŭa regiono). Estas ĝojige vidi, kiam venas dudeko da homoj al la kunvenoj, kaj ke oni eĉ volas fari plian monatan renkontiĝon ! Se kompari kun Ukrainio, rimarkindas, ke ĉi tie estas pli da viraj esperantistoj (same kiel en Usono), dum en Ukrainio estas pli da virinoj.

Joel : La plej frapa diferenco por mi (t.e. kompare kun sudorienta Usono) estas la abundo de regionaj renkontiĝoj ĉi tie: havi du bonajn regionajn aranĝojn jare, nome MeKaRo kaj ARE, estas vera lukso!

### **Ĉu vi jam spertis la lokan vintron ?**

Ĵenja : Vintro en Montrealo estis tre simila al vintro en Kievo (sed tamen kun pli da neĝo), kaj ankaŭ Joel spertis la ukrainan vintron, do, li estis preta, kaj eĉ atendis pli malvarman vintron.

### **Kiel diferencas ĝenerale la vivo en Montrealo kaj en via urbo/regiono ?**

Ĵenja : Estas interese aŭdi, ke homoj ĉiam plendas pri la publika transporto tie ĉi, sed oni eĉ ne povas imagi, kiom pli bona ĝi estas ol en Atlanto, kie sufiĉe ofte la busoj venas nur ĉiun horon, kaj kie

oni serioze pripensas entute nuligi la trajnojn sabate kaj dimanĉe, ĉar la registaro ne volas subvencii la publikan transporton ! Kompreneble, estas pluraj diferencoj en la homa konduto : oni ĉi tie vicas por la busoj — oni kutime ne faras tion en Usono, kaj faras tre malofte en Ukrainio.



Joel : Unue mi diru ke ĝenerale homoj en mia denaska regiono estas tre varmaj, simpatiaj, ĝentilaj kaj bonkoraj, aparte je interpersona nivelo. Aliflanke la kolektiva pensmaniero, prioritatoj kaj politikaj inklinoj tre malsamas de ĉi tie, kaj ankaŭ de miaj personaj. Georgio estas tre konservativa ŝtato, kie religio (evangelia kristanismo, ĉefe) kaj soci-konservativismo dominas la politikan vivon kaj la pensmanieron de la plejmulto. Aldoniĝas al tio tipe usona hiper-individuismo kaj hiper-kapitalismo, kio kune rezultas en malsufiĉa, kadukiĝanta publika transporto (tie kie ĝi ekzistas entute), esence neekzistantaj socialaj servoj kaj diversaj reakciaj leĝoj (konstitucia amendo [en Georgio kaj pluraj aliaj ŝtatoj] kontraŭ la rajto de samseksaj paroj edziĝi, kruelaj kontraŭ-enmigrantaj leĝoj, ktp.).

Aliflanke, ĉi tie mi trovas la kolektivajn pensmanieron kaj prioritatojn multe pli progresemaj, toleremaj kaj « kolektivismaj » (t.e. komuna zorgo pri la bonfarto de ĉiuj, de la naturo, de kulturaj heredaĵoj, ktp.). Por ilustru la diferencon sufiĉas kompari la gvidantojn de Kebekio kaj Georgio : Jean Charest estas konsiderata

ĉi tie kiel centra-dekstra (aŭ, laŭ certaj studentaj grupoj en UQAM, ekstrem-dekstra !) — kompare kun la nuna ŝtatestro de Georgio, Nathan Deal, Charest aspektas kiel plenuĝa socialisto !

## **Kiom longe vi studis la francan antaŭ ol veni ? Ĉu estis sufiĉe facile alkitimiĝi al la kebekia franca ?**

Ni studis ĉ. 3 jarojn, aŭtodidakte kaj en la franca kultur-centro. La kebekia franca ne estis ŝoko por ni, ĉar ni provis alkitimiĝi aŭskultante la radion kaj televidon per la reto kaj rigardante kebekiajn filmojn, kvankam mi (Ĵenja) ankoraŭ ne povas diri, ke mi komprenas ĉiujn je 100% — ĉio dependas de la persono kaj de la forteco de la akĉento.



# Kiel traduki ? Comment traduit-on?

*Voici une rubrique que nous reproduisons du mensuel de SAT-Amikaro, La Sago. Nous les remercions et espérons que vous saurez apprécier.*

**Ekde nun *La Riverego* publikigos rubrikon prenitante el la gazeto de SAT-Amikaro, *La Sago*. Ni kore dankas ilin por la permeso uzi ilian rubrikon.**

La franclingva substantivo **coup** havas tre diversajn signifojn kaj estas uzata en multaj lokucioj. Mi ĉi-sube donos nur kelkajn ekzemplojn de ĉiu grupo de signifoj. Tio gvidos la leganton por traduki analogajn esprimojn.

■ La propra senco de **coup** estas «ektuŝego per rapida forta movo»; tiam la traduko ofte estas **bato** aŭ derivaĵo:

Donner des coups à quelqu'un. **Batadi iun.**

Rendre coup pour coup. **Redoni baton por ĉiu bato.**

Rouer quelqu'un de coups. **Draŝi iun.**

Donner un coup de poing sur la table. **Bati la tablon per pugno.**

Se donner un coup contre un angle de meuble.  
**Albatiĝi al angulo de meblo.**

Un coup bas. **Subzona bato.**

Un coup de corne. **Kornobato.**

Un coup de bec. **Bekpiko.**

Un coup de baton. **Bastonbato.**

Un coup de couteau. **Tranĉilpiko.**

■ En dua grupo **coup** koncernas **pafo**:

Un coup de feu. **Pulvopafo.**

Le coup est parti. **La pafo ekis.**



Subzona kornobato

Le coup passa si près que le chapeau tomba    **La pafaĵo pasis tiel proksime, ke falis la ĉapelo.**

Faire d'une pierre deux coups.    **Trafi du celojn per unu ŝtono.**

- En tria grupo **coup** havas figuran sencon elvokantan agon subitan aŭ perfortan, kaj ofte tradukiĝas per **frapo** aŭ **bato**:

Un coup de chaleur, de soleil.    **Varmofrapo, sunfrapo.**

Un coup de théâtre.    **Teatrofrapo. \***

Un coup de tonnerre.    **Frapo de tondro.**

Un coup de foudre.    **Fulma enamiĝo.**

Fraper un grand coup.    **Fari grandan frapon.**

Tenir le coup.    **Rezisti.**

Cette année il a pris un coup de vieux.    **Ĉi-jare li videble maljuniĝis.**

Il lui est arrivé un coup dur.    **Trafis lin grava bato.**

Les coups du sort.    **La batoj de l' sorto.**

Être sous le coup d'une émotion.    **Esti frapita de emocio.**

- En kvara grupo **coup** esprimas movon de korpoparto; la traduko dependas de tiu parto:

D'un coup d'aile.    **Per flugilbato.**

D'un coup de reins.    **Per lumbostreĉo.**

D'un coup d'œil.    **Per ekrigardo.**

Donner un coup de main à quelqu'un.    **Helpi iun.**

Par ce coup de main ils ont conquis le pont.    **Per tiu surpriza atako ili konkeris la ponton.**

- En kvina grupo **coup** esprimas movon de objekto aŭ ties sonon:

Cette veste aurait besoin d'un coup de brosse.    **Tiu jako bezonas brostiron.**

Un coup de pinceau.    **Peniktiro.**

Se passer un coup de peigne.    **Ekkombi siajn harojn.**

D'un seul coup de marteau il a cloué la photo au mur. **Per unu martelbato li najlis la foton ĉe la muro.**

Saluer d'un coup de chapeau. **Saluti ekdemetante la ĉapelon.**

Passer un coup de fil, de téléphone. **Telefoni.**

En mettre un coup. **Strebi.**

Traduire à coups de dictionnaire. **Traduki per ofta konsulto de vortaro.**

Au coup de sifflet le chien revient. **Ĉe la ekfajfo la hundo revenas.**

Les 12 coups de midi. **La 12 batoj de tagmezo.**

■ En sesa grupo **coup** esprimas agon pli-malpli hazardan aŭ ludan - tiam la traduko dependas de la ludo:

Jouer sa vie sur un coup de dé. **Riski sian vivon per ĵeto de kubo.**

Au tennis il y a des coups droits et des revers. **Ĉe teniso estas rektaj batoj kaj retrobatoj.**

Au football il y a toujours un coup d'envoi et parfois des coups francs. **Ĉe futbalo estas ĉiam komenca ŝoto kaj kelkfoje liberaj ŝotoj.**

C'est un coup de chance, d'avoir réussi. **Tio estas hazarda sukceso.**

Réussir ou manquer son coup. **Trafi aŭ maltrafi sian celon.**

Discuter le coup. **Babili.**

Un coup monté. **Insido.**

Un coup de force. **Perfortaĵo.**

Un coup d'État. **Ŝtatrenverso.**

Tenter le coup. **Provi.**

Être dans le coup. **Esti en la sekreto; partopreni; ne esti ekstermoda.**

Faire les quatre cents coups. **Petolegi.**

Monter le coup à quelqu'un. **Mistifiki iun.**

- En la sepa kaj lasta grupo **coup** havas signifon pli-malpli proksima al fojo:

Boire un coup de trop. **Drinki unu glason troan.**  
 Je te paye un coup. **Mi regalias vin per trinkaĵo.**  
 Du premier coup. **Ĉe la unua provo.**  
 Ce coup-ci, c'est le bon. **Ĉi-foje estas bone.**  
 Du coup. **Pro tio.**  
 Du même coup. **Samokaze.**  
 Coup sur coup. **Sinsekve.**  
 Sur le coup. **Tuj.**  
 Après coup. **Poste.**  
 À coup sûr. **Certe.**  
 Tout à coup. **Subite.**

Certe!  
Tamen, tuj!

Vi jam trinkis  
sep glasojn sinsekve,  
kaj pro tio, vi volas  
ke mi regalu vin per  
trinkaĵo!  
Ĉu ne estus drinki  
unu glason troan?



\* Eĉ se "teatrofrapo" estas N.PIV-a,  
ĝi tamen ne estas komprenebla por  
nefranclingvanoj, kiel mi (Ĵ. Amis)



[www.sat-amikaro.org](http://www.sat-amikaro.org)

**Aliĝu al ARE-18**  
**Kie : Silver Bay, NY**  
**Kiam : 8-10-an de oktobro 2011**  
**<http://esperanto.qc.ca>**

**Vi estas bonvena partopreni la**  
**Jarkunsidon de ESK, la 16-an de**  
**septembro 2011. Bv. vidi detalojn**  
**sur la antŭlasta paĝo**

# 150 000 artikoloj en la Esperanta Vikipedio



Speciala

## Statistiko

Paĝaj statistikoj	
Enhavaj paĝoj	151 897
Paĝoj (Ĉiuj paĝoj en la vikio, inkluzivante diskuto-paĝojn, alidirektilojn, ktp.)	332 603
Alŝutitaj dosieroj	9 581
Redaktaj statistikoj	
Paĝaj redaktoj ekde Vikipedio estis starigita	3 830 199
Averaĝa kvanto de redaktoj je paĝo	11,52
Pri la uzantaro	

En dimanĉo, 7-a de aŭgusto 2011, la Esperanta Vikipedio atingis la nombron de 150 000 artikoloj. Per tio la enciklopedio en la internacia lingvo havas lokon 27 inter la diverslingvaj versioj de Vikipedio, tuj post la araba kaj la dana versioj.

La Vikipedio multe helpas al la uzado de Esperanto flanke de parolantoj en pli ol 120 landoj de ĉiuj kontinentoj kaj al ilia kleriĝo. Ĝi estas ofte konsultata paĝaro kun ĉiutage pli ol 400 000 paĝorigardoj. Tiurilate ĝi tenas lokon 34 inter la diverslingvaj versioj de Vikipedio.

Aldone al la Vikipedio ekzistas en Esperanto maŝine tradukita versio de la anglalingva vikipedio,

Wikitrans, kiu havas pli ol tri milionojn da artikoloj. Kvankam maŝine tradukita ĝi estas relative bone komprenebla kaj servas al multaj Esperanto-parolantoj.

Maŝinaj tradukoj helpas ankaŭ en la plua ellaboro de la Vikipedio. Ekzistas du specialaj paĝoj, kiuj subtenas la kreadon de novaj artikoloj, GramTrans kaj Vikitradingilo.

(el Libera Folio)

## Korekto

*Silvano La Lacerto Auclair*

Estis en mia pasintnumera artikolo *Reen al fontoj* du eraretoj, pri kiuj min atentigis la aŭtoro de la lingvo. Unue, ĉiuj povis rimarki, ke la deklinacia tabelo malhavis unu kazon ; interesitoj povas trovi la ĝustan tabelon ĉe la retejo pri sambahsa. Due, mi misindikis la prononcon de la forto *forest* ; ĝi devus esti / for<sub>ɛ</sub>st /. La eraro venas el la fakto, ke mi ne identigis la literojn *for-* kiel prefikson, kaj prefiksoj ne povas porti ackenton. Temas pri malfacileco de la lingvo...

## Nova adresaro de Pasporta Servo aperis

La ĉi-jara adresaro de Pasporta Servo enhavas 1087 gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj. Ĝi estis redaktita de Alexandre Baudry kaj unuafoje prezentita dum la Internacia Junulara Kongreso en Kievo kaj la Universala Kongreso en Kopenhago. Kiel en multaj aliaj movadaj statistikoj, ankaŭ en la nova adresaro la unuan lokon okupas Francio kun 169 gastigantoj. Francio havas ankaŭ la plej grandan nombron da urboj (91), kie troviĝas gastiganto. La pakistana urbo Multan siavice estas la urbo kun plej multe da adresoj (21).


En la 188-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri iliaj loĝlokoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo.

La ideo pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Rubén Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas

gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009, Pasporta Servo fariĝis ankaŭ socia retejo, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. Ĝi ne anstataŭas la presitan libron sed ofertas aldonajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri vojaĝo, kaj blogejo por rakonti pri siaj vojaĝoj. La retpaĝo nun havas pli ol 2000 uzantojn.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 EUR plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.



**Ĉu vi ankoraŭ ne membras en Pasporta Servo? Ne atendu la sekvan eldonon de la libro, ĉar eblas aliĝi nun, per la interreto! Vizitu la retejon [www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org) aŭ skribu al via landa delegito, Yevgeniya (Ĵenja) Amis: [yevgeniya.amis@gmail.com](mailto:yevgeniya.amis@gmail.com).**

(laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Temo</i>
Vendredo	16-a de septembro 2011	19 h 30	Commensal St-Denis	Jarkunsido de ESK
Vendredo	30-a de septembro 2011	18 h 00	MEDO (Meksika vespermanĝo)	alportu ion !
Vendredo	14-a de oktobro 2011	19 h 30	Commensal St-Denis	
Vendredo	28-a de oktobro 2011	18 h 00	MEDO (Turka vespermanĝo)	alportu ion !
Vendredo	11-a de novembro 2011	18 h 00	Commensal St-Denis	
Vendredo	25-a de novembro 2011	19 h 30	MEDO (Ukraina vespermanĝo)	alportu ion !
Sabato	17-a de decembro 2011	19 h 30	Commensal	152-a datreveno de L.L. Zamenhof

Noto : manĝo je la 18-a h, babilado ekde 19 h 30

**Commensal St-Denis** (restaurant végétarien — rue Saint-Denis) :

1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro "Berri-UQAM"), Montréal.

[http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint\\_denis](http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis)

**MEDO (Montreala Esperanto-Domo)**: 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

## Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

★	8-10-a de oktobro 2011 : ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silver Bay, Nov-Jorkio	Aliĝu nun!
★	19-21-a de majo 2012 : 9-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio	
	22-25-a de junio- 2012 : Landa Kongreso de Esperanto-USA	Dalaso, Usono	
	28-a de julio - 4-a de aŭgusto 2012 : Universala Kongreso de Esperanto	Hanojo, Vjetnamio	
	5-12-a de aŭgusto 2012 : Internacia Junulara Kongreso	Tenri, Japanio	



**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**

**La Riverego** estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko:** Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca).  
**Korektado kaj lingva konsilado:** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.  
**Estraranoj de ESK:** Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Yevgeniya Amis (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono /**  
**Échéance pour le prochain numéro :**  
**2011.11.20**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**  
**6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8**

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)  
(Voir site web pour un plan d'accès)

*Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo*  
*Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement*

**La Riverego** (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme:** Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca).  
**Correction:** Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE:** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Yevgeniya Amis (conseillère).

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8**  
**info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

**Service de librairie postale à Montréal**

**La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.**

**Service de librairie postale à Montréal**

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

[www.esperanto.qc.ca/katalogo](http://www.esperanto.qc.ca/katalogo)

**Pasporta Servo**

**Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :**

**www.pasportaservo.org.**

**Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.**